

la Riverego

Bulteno de la Esperanto-Societo Kebekia
Decembro 1988-a. N-ro 13-a. Jarkolekto 3-a. 0,75 \$

Konsiloj por Esperantistoj

Konsciu, ke vi estas membro de tutmonda lingva komunumo.

Kredu la celon de Esperanto.

Lernu kutime kaj ellernu la lingvon.

Laŭ via kapablo entreprenu ian laboron.

La Esperanta literaturo estas nia kulturo. Legu, por ke vi akiru ĉi tiun kulturon.

Konu la historion de Esperanto.

Ne hontu, ke vi parolas vivantan lingvon Esperanton.

Pri Esperanto ĉiam nur la faktojn diru.

Se Esperanto ne plaĉas al vi, ne volu ĝin reformi, sed forlasu la movadon.

Esperanto-amo rilatas nur al la lingvo. Ĉio alia estas ĉies privata afero.

La valoron de Esperanto neniam juĝu nur laŭ kelkaj ĝiaj adeptoj.

Ne kredu, ke ĉiu Esperantisto laŭ ĉi tiuj principoj vivas.

El « Nia bulteno », de la Portugala Esperanto-Asocio. Sept.-Okt. 1988

Lasta numero - Dernier numéro

de l'année 1988 - de la jaro 1988-a

Si vous voyez cette inscription (Lasta numero - Dernier numéro) au-dessus de votre nom, il est grand temps de renouveler votre adhésion à la Société québécoise d'espéranto. Sinon, vous quitterez le mouvement espérantiste et ne recevrez plus de ses nouvelles. Allez donc tout de suite remplir le formulaire de la dernière page. Ce n'est qu'en unissant nos forces que nous pourrons faire progresser le

mouvement espérantiste québécois et mondial.

Se vi povas legi [Lasta numero - Dernier numéro] sur via adreslipo, rapidu rememбриги en E.S.K. Se vi ne faros, vi ne plu estos membro kaj ne plu ricevos *la Riveregon*. Iru tuj plenumi la lastan paĝon. Nur per unuigintaj fortoj ni povos progresigi la Kebekian kaj mondan E-movadon. □

Bulletin trimestriel de la Société québécoise d'espéranto.

La Riverego estas eldonata de Esperanto-Societo Kebekia. Aperas trimonate. Eldonkvanto : 250. ISSN 0830-9574. Dépôts légaux: bibliothèques nationales du Canada et du Québec.

Premier trimestre 1986.

Redaktanto: Sylvain Auclair.

Kunlaboris Suzanne Bolduc, Normand Fleury, Patrice Mongeau, Sylvain Quirion kaj Cyrille Robidoux

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Senpage por la membroj de E.S.K. Por la aliaj: jara abono: 5 \$ por mara sendo; 6 \$ por aera sendo. UEA-kodo: kebk-d.

Unuopa numero: 0,75 \$, plus sendokostoj.

Limdato por la venonta numero : 1-a de marto 1989-a.


Adreso: Esperanto-Societo Kebekia
C.P. 126, succ. « Beaubien »
Montréal, Québec
KANADO H2G 3C8

Internacia enketo

de Normand Fleury

En 1985-86, Nikola Rašić, de Zagreb en Yougoslavie, a distribué un questionnaire lors de rencontres espérantistes. Il s'agit de la plus grande enquête sur le mouvement espérantiste - 250 participants de 30 pays. En bref : les espérantistes appartiennent à la classe ouvrière à 70 % et la majorité de ceux qui ont complété l'enquête était des enseignants. Les espérantistes sont considérés comme très tolérants puisque 92 % des répondants se sont déclarés neutres face à l'homosexualité - considéré comme un sujet indicateur. Ils parlent en moyenne 3,4 langues et les raisons pourquoi ils utilisent l'espéranto sont : aisance à communiquer dans cette langue ; communauté espérantiste bien structurée ; pour le tourisme et le loisir. Un rapport complet sera publié en 1989.

Dum du jaroj (1985-86), Nikola Rašić el Zagrebo disdonadis centojn da enketiloj al geesperantistoj dum internaciaj esperanto-aranĝoj. Lia celo estis pli koni la esperantistaron. Jen resume la respondoj al kelkaj demandoj laŭ notoj faritaj dum prelego ĉi-somere kadre de la Internacia Junulara Kongreso (Zagrebo). La enketon partoprenis 250 personoj el 30 landoj.



Generale : La esperantistoj apartenas al meza klaso en la socio, 70 % estas el laborista familio. Plej ofta profesio « instruisto ». Pli multe deklaris sin malreligiema kaj 40 % estas el

miksetna, minoritata deveno aŭ estas ano de internacia paro.

Mondproblemo : Kio estas la plej grava problemoj en nuntempa mondo? Al tiu demando, 66 % respondis : la rivaleco inter Usono kaj Sovetunio.

Toleremo : Kutime, socia grupo, kiu ne malfavoras al samseksemo, estas taksata tolerema grupo. Al la demando : « kion vi opinias pri samseksemo? », la respondoj prezentas la esperantistaron kiel unu el la plej toleremaj sociaj grupoj. La rezultoj estis : 42 % privata afero, 30 % oni ne diskriminaciu ilin, por 20 % temas pri malsano, por 6 %, ĝi estas malbono kaj ili kontraŭstaras samseksemulojn, 2 % deklaris sin samseksemaj.

Eminentulo politika : Laŭ vi, kiu estis la plej bona politikisto de post la 2-a mondmilito? Responde : M. L. King, Tito, W. Brandt, L. Walesa, S. Allende, F. Castro, De Gaule, Mao Zedong... Respondoj al

demando pri plej eminenta aŭ estiminda persono en monda historio estis : Gandhi, J. F. Kennedy, Papo Johan-Paŭlo la dua, Patrino Teresa, L. L. Zamenhof, Kristo... Denove la respondoj plej diversis kaj prezentas la esperantistaron kiel malsamideologian kaj malsamopinian socian grupon.

Lando-taksado : Kiel vi taksas la jenajn 18 landojn en skalo de + 3 (plej ŝatata) al - 3 (plej malŝatata) ?

+ 3 : Svisio, Jugoslavio, Francio, Pollando.

+ 2 : F. R. Germanio, Germana D. R., Ĉinio, Hindio.

+ 1 kaj 0 : neniu

- 1 : Algerio, Brazilo, Malto, Nikaragvo.

- 2 : Sovetunio, Usono, Israelo.

- 3 : Albanio, Irano, Sudafriko.


Familie : Ĉu via vivkunulo esperantistas ? Jes : 66 %, ne : 31 %, estos : 3 %.

Ĉu viaj infanoj parolas esperanton ? Jes . 40 %, ne : 45 %, parolos : 13 %.

Analizo de tiuj du respondoj prezentas la esperantistaron kiel tre fermitan grupon kaj kiu biologie reproduktiĝas.

Lingve : Kiom da lingvoj vi parolas ? Meze ili parolas 3,4 lingvojn. 7 % havas pli ol unu gepatra lingvo, 4 % ne konas alian lingvon ol esperanton kaj gepatran. Kiujn lingvojn vi parolas krom esperanton ? Plej oftaj estis: angla, franca, germana... Entute

estis menciitaj 30 lingvoj.



Esperantisme : Kial vi bezonas esperanton ?

- Komunika alternativo sed ne konkurenco.

- Volas pli bonan komunik-kvaliton.

- Komunumo estas strukturita.

- Ne uzas esperanton por profesia vivo sed por turismado, libertempado.

Ĉu vi kredas al la fina venko* ? 23 % kredas, 20 % pensas, ke la homaro ne estas preta, 6 % ne kredas, ke estas bezono, 24 % dubas sed ŝatus, 4 % diras, ke okazos per hazardo, 9 % opinias, ke ne necesas ĉar estas bone vivi en rondo familia.

Mi esperas, ke tiuj notoj iel interesis vin ; la Internacia Kultura Servo en Zagrebo intencas eldoni libron en 1989 pri la kompletaj respondoj kaj rezultoj de la enketo. □

*Fina venko : La tago kiam ĉiuj parolos esperanton.

Movadaj informoj

Novaj asocioj.

Antaŭnelonge fondiĝis en Brita Kolumbio la Pac-Arka Societo (P.A.S.). Unu el ĝiaj celoj estas la propagando pri Esperanto. Post longa diskutado okazinta en Montrealo kun Wally du Temple (prezidanto de la Kanada Esperanto-Asocio kaj de F.A.S.), kaj aliaj reprezentantoj de K.E.A. kaj de E.S.K., estis interkonsentite, ke P.A.S. plenumos la informan agadon pri Esperanto en la tuta angla-lingva Kanado, same kiel E.S.K. por la franc-lingvanoj. P.A.S. nun havas membrojn ĉefe en Brita Kolumbio kaj en Vaŝintonio.

Cetere, oni anoncas baldaŭan verŝajnan fondon de Ontaria Esperanto-asocio.

La Riverego.

La librovendejo Zone libre, ĉe la strato Sainte-Catherine, en Montrealo, kiu jam vendas kelkajn Esperanto-librojn, nun vendos ankaŭ ekzemplerojn de *la Riverego*. Verŝajne bona maniero por interesi homojn pri E-o. Cetere, ĉia helpo por plibonigi *la Riveregon* estas bonvena: la bulteno devas esti aĉetinda por 0,75 \$.

La Riverego baldaŭ sendiĝos per la dua klaso de la poŝto. Tio ebligas ŝparon de mono.

Regroupement Loisir

Québec. Laŭ propono de Pierre Chicoine, membro de E.S.K., la estraro akceptis la ideon membrigi en la Regroupement Loisir Québec. Tio estas asocio de preskaŭ ĉiuj tut-Kebekiaj distrasocioj. Kun pluraj el ili ni povus pli efike rilati kaj tiel informi pri Esperanto. Ni pensu nur pri la geskoltoj, la junular-gastejoj, la poŝt-mark-kolektantoj, biciklantoj, k.t.p. Kompreneble, E.S.K. aliĝos nur, se la kotizo ne estas tro granda, eĉ se ni povos havi servojn kontraŭ ĝi: ĉambroj, presado, telefono, k.s. Kion vi pensas pri tio ?

La venonta renkontiĝo

de la Esperanto-Societo Kebekia okazos en Saint-Irénée, apud la Malbaie, dum la maja longa semajnfino: 20-22. Tuj rezervu tiujn datojn. La programo ankoraŭ ne estas findecidita, sed tutcerte estos turisma vizitado en Charlevoix. La Esperantistoj de Baie-Saint-Paul havos unuan okazon renkonti aliajn samideanojn.

Ni loĝos en la *Studios du Dumaine Forget*. Ĉiu dometo povas gastigi tri aŭ kvin homojn, kaj enhavas plenan kuirejon (ne estos komuna manĝejo) kaj necesejon. Estas de tie belega vido al la riverego Sankta-Laŭrenco.

Dum la sama semajfino, okazos la unua Ontario Esperanto-Kongreso, en Otavo. Kontakto la Lokan Kongresan Komitaton :

leterfako 554, filio B

Otavo ON K1P 5P6

televoknumero :

(613) 236 27 98

La aŭtuna renkontiĝo verŝajne okazos en Hull (eble kune kun la Ontario Esperanto-Asocio). Pri la vintra, ni petas proponojn pri la stilo kaj la loko.

Cetere, neniu plu scias, ĉu kaj kie la jara kongreso de la Kanada Esperanto-Asocio okazos. La Torontanoj decidis ne gastigi ĝin, kiel jam konsentite. Ŝajnas, ke ĝi okazos en Ĉikago, kune kun la kongreso de E.L.N.A.

Telefono. Por pliefikigi la informadon pri Esperanto, E.S.K., kune kun la Libroservo de K.E.A. kaj la Montreala Esperanto-Klubo, decidis ekhavi telefonon. Ĉar ni maltrafis la limdaton por la ĵusa telefonlisto, la linio ekvalidos

venont-somere. Sekve homoj povos trovi nin per simpla demando al telefonisto.



Ŝerbruka Esperanto-Societo partoprenis en la Ŝerbruka Librofoiro, kie ili povis konigi Esperanton al la vizitantoj. La klubo devis pagi 250 \$, el kiuj 100 \$ pagis K.E.A.

Ĝenerala kunsido : Ĉiuj ordinaraj membroj de la Societo estis invititaj partopreni specialan ĝeneralan kunsidon, 28-an de novembro. Aŭ sendi prokurilon. La Societo ricevis pli ol 30 prokurilojn, tiel ke eblis kvorume aprobi ĉiuj proponojn kvankam ĉeestis nur la estraranoj. La estraro do povas antaŭenigi la projekton pri la karitataj kvitancoj. □

Notre société

La librairie Zone libre, rue Sainte-Catherine, qui tient déjà des livres en espéranto, vendra dorénavant aussi *la Riverego*. Sans doute un bon moyen d'acquérir de nouveaux

ami-e-s de l'espéranto.

Regroupement Loisir Québec La S.Q.E. deviendra peut-être bientôt membre du Regroupement Loisir Québec, dont

sont membres les principaux organismes nationaux de loisir. Nous pourrions alors entretenir des relations plus suivies avec des associations (comme celle des auberges de jeunesse) avec lesquelles nous avons des affinités particulières, et leur faire connaître les avantages offerts par l'espéranto.

La prochaine rencontre

de la Société québécoise d'espéranto aura lieu à Saint-Irénée, près de la Malbaie, dans la belle région de Charlevoix du 20 au 22 mai 1988. Le programme n'est pas encore au point, mais il y aura certainement une visite de la région.

Nous logerons dans les studios du Domaine Forget. Chaque studio peut héberger de trois à cinq personnes et comprend une cuisine équipée (la cafétéria sera fermée) et une salle de bain. Le domaine Forget offre une magnifique vue sur le fleuve Saint-Laurent. Nous aurons aussi accès à des salles de réunion.

Durant la même fin de semaine,

aura lieu à Ottawa le congrès de fondation d'une association espérantiste ontarienne. Le tout se déroulera uniquement en espéranto.

À l'automne, nous irons sans doute à Hull (peut-être en collaboration avec l'association ontarienne d'espéranto). Quant à l'hiver prochain (1989-90), nous attendons les suggestions.

Une assemblée générale extraordinaire s'est tenue le 28 novembre 1988. À l'ordre du jour : requête de modification des lettres patentes et modification des règlements généraux, afin de pouvoir obtenir le statut d'organisme de charité et pouvoir émettre des reçus pour fins d'impôt. Même si peu de membres sont venus, le quorum a pu être atteint grâce aux procurations.

Nos lettres patentes et règlements généraux seront donc amendés. Accessoirement, la catégorie de membre *Ami cohabitant* a été créée. □

Quelques revues espérantistes

Cet article a pour but de présenter les principales revues publiées en espéranto. Son texte reprend celui d'un des quatre feuillets d'information publié par la Société québécoise d'espéranto. (Les prix sont ceux de 1988.)

Esperanto est publié onze fois l'an par l'Association mondiale d'espéranto (U.E.A.), à Rotterdam. C'est l'organe officiel de l'association. On y présente des reportages sur les événements qui, de par le monde, touchent le mouvement espérantiste. Certaines rubriques sont particulièrement utiles: le *kalendaro* (calendrier) des rencontres organisées par des associations espérantistes ; *Laste aperis* qui présente mensuellement les derniers livres parus en espéranto et sur l'espéranto ; *Esperanto en radio*, un tableau des émissions radiophoniques (le plus souvent sur ondes courtes) en espéranto.

Esperanto est expédié à tous les membres-abonnés de l'Association mondiale d'espéranto (40 \$) ; on peut aussi simplement s'y abonner (24 \$)



Kontakto est publié six fois l'an par l'Organisation mondiale des jeunes espérantistes (TEJO). Il est donc envoyé à tous les membres individuels de l'U.E.A. âgés de 26 ans ou moins. On peut aussi s'y abonner (17,10 \$). Contrairement à *Esperanto*, *Kontakto*

traite en espéranto d'une foule de sujets, pas du mouvement espérantiste. Il adopte souvent la forme de numéros thématiques. De plus, une certaine partie des articles sont écrits en espéranto *facile*, à partir d'une liste réduite de vocabulaire. *Kontakto* convient donc particulièrement aux débutants.

TEJO publie aussi six fois l'an un bulletin de liaison plus modeste, *TEJO-Tutmonde*.

Monato, comme *Kontakto*, ne traite pas du mouvement espérantiste, mais du monde en général. On y touche une foule de sujet : politique, société, littérature, anecdotes, grands dossiers sur des sujets variés, sans oublier le coin des enfants, des jeunes, la recette de cuisine mensuelle, le nouvelle mensuelle... ouf ! On pourrait un peu la comparer à *l'Actualité*, à ceci près que les articles sont en espéranto et sont écrits dans le pays où l'action se passe : point de vue incomparable. Comme son nom l'indique, *Monato* est publié mensuellement. (Abonnement par bateau : 39 \$, par avion : 44 \$)

Monato publie aussi annuellement un agenda-almanach, *la Jaro* (4,90 \$ / 5,50 \$)

El popola Ĉinio est une des revues espérantistes dont le tirage est le plus élevé,

principalement à cause de son prix très compétitif et de sa grande qualité. Illustrée de nombreuses photos en couleurs, cette revue mensuelle traite principalement de la culture et de la société chinoises. On y publie aussi des traductions de courtes œuvres littéraires chinoises. (un an : 14 \$, deux ans : 23 \$, trois ans : 33 \$)

Heroldo se présente comme la revue la plus fréquente du mouvement espérantiste : seize fois l'an. Dans un format journal, avec quatre ou huit pages, *Heroldo* présente les derniers événements du monde espérantiste.

Lumo. Comme toutes les associations espérantistes, l'Association canadienne d'espéranto publie une revue, *Lumo*, qui paraît trois ou quatre fois par année. On y traite et on y discute de la vie de l'association, du mouvement en général et de nombreuses autres choses. Pour recevoir *Lumo*, il faut être membre de l'association canadienne d'espéranto. (12 \$ si l'on est membre de la S.Q.E. ou d'un club, 24 \$ autrement).

Parmi les organes d'associations, on doit aussi mentionner *La franca esperantisto* qui publie fréquemment des numéros littéraires qui contiennent des traductions d'œuvres françaises célèbres.

Literatura foiro et Fonto

sont deux mensuels espérantistes culturels et littéraires. On y publie des nouvelles et des poèmes, ainsi que des critiques littéraires et des discussions sur des sujets culturels et linguistiques. (*Literatura Foiro* : 52 florins néerlandais ; *Fonto* : 45 florins)

EN VRAC, voici le titre de quelques autres revues : *Esperantista vegetarano*, *Espero katolika*, *Simpozio* (philosophie), *Et-nismo*, *La Gazeto*, *Internacia jura revuo*, *Juna amiko* (pour une clientèle scolaire), *Kulturaj kajeroj* (de La-Chaux-de-Fonds), *Fokuso* : *internacia komputado*, *Dia regno*, *Kvakera esperantisto*, *Medecina internacia revuo*, *Oomoto* (d'un mouvement religieux japonais), *Paco*, *SAT-Amikaro*, *Sennaciulo*. Sans compter les nombreuses revues d'associations nationales, certaines de très haut calibre (même si elles ne sont pas toutes entièrement en espéranto).

On peut s'abonner à la plupart de ces revues par l'entremise de la librairie de l'Association canadienne d'espéranto (adresse de la S.Q.E.). Cependant, pour *Esperanto* et *Kontakto*, on doit s'adresser à la représentante de l'U.E.A. au Canada :

Merle Haltrecht-Matte
7083, rue Notre-Dame
Orléans (Ontario)
K1C 1J1

par Sylvain Quirion

Le soleil n'était pas au rendez-vous mais la pluie non plus. Seul du temps frais, des nuages (temps typiquement automnal) et une vingtaine d'espérantistes endiablés étaient présents pour la fête. Au menu: des jeux, des excursions, des activités culturelles ainsi que des visites de sites historiques au vieux Trois-Rivières et aux forges du Saint-Maurice; servi dans un site enchanteur et assaisonné d'imagination et de polémiques amicales.

La 14-a de oktobro 1988, Régis Ostigny kaj mi alvenas ĉe la skoltan domon. Temas pri duetaĝa domo kun grandega manĝoĉambro estanta la tuta unua etaĝo. La dua etaĝo entenas tridek ses litojn en ses ĉambroj, kaj la necesejon. La loko ne estas tro luksa sed tamen tre oportuna. Régis kaj mi ektrinkas bierojn. Li rakontas al mi pri sia vojaĝo al Jugoslavio por la pasintjara junulara kongreso.

Tiam Manuel Campagna, Marcel Desjardins kaj Bre Moussa Didmande alvenas. Bre estis la sola ĉeestanta Tririverano. Li devenas de Ebura Bordo, kie li lernis la esperantan. Li nun studas ĉe la Kebekia Universitato en Tririvero. Ankoraŭ alvenis vendredon vespere Normand Fleury kaj Zdravka Metz, kunportante la mangajon, la ĉarma Kora Brent-Palmer kaj la teruraj infanoj Mira kaj Damir. Des pli du mirindaj beboj venis. Temas pri Gabrielle, bebo de Denise Richard kaj de Sylvain Bélisle, kaj la pli konata Maryse (almenaŭ en Montrealo), bebo de Suzanne Bolduc kaj de Patrice Mongeau. La gepatroj de Gabrielle

veturigis ankaŭ Kambi Djabir Twahibu, Zairian esperantiston studantan ĉe la universitato Laval en Kebeko. Dum la vespero, ĉiuj elektis dormoĉambron kaj liton, oni ankaŭ multe babilis.

Sabaton matene Normand preparas la matenmanĝon, ĉiuj bone plenigas sin antaŭ la piedirado. Marcel gvidas nin, ĉar li jam esploris la padojn vendredon vespere. La padoj estas tre belaj, ili iras tra la arbaro kun multaj pontetoj transirantaj la multajn riveretojn. Kelkaj padoj ankaŭ kondukas nin laŭ la rivero Sankta-Maŭrico kaj prezentas multajn mirindegajn vidpunktojn.

Poste ĉiuj rapide sin prezentas dum U. Paul Ronald, Rom Séguin kaj Mario Lépine alvenas. Ĝustempe por ludi skrablon kaj festi la naskiĝtagon de Sylvain B. Ĉio-ĉi organizata de Mario, la kuzo de Sylvain B. Posttagmeze oni vizitas la malnovan parton de Tririvero, ĝiajn parkojn kaj kelkajn muzeojn. Ĉiuj vespermanĝas ĉe vegetara restoracio. Reveninte en la skoltan domon, oni ludas ludon dum Normand estas intervjuata de la

loka televidstacio pri Esperanto. La teamo *Krokodilo*, tiel nomita pro la krokodilemo de unu el siaj membroj (Mario, kiu nun estas lernanta la Esperantan en Svislando) gajnas la matĉon : kia honto ! Versajne dank'al la helpo de Sylvain Auclair.

Dimanĉon matene Normand denove preparas la matenmanĝon. Mi rekomendus al vi la griajon

kun sekvinberoj, ĝuoplena ! Finfine oni vizitis la straton Esperanto en Trivero kaj la forgejojn Sankta-Maŭrico, la unuan industrion en Kanado. Bedaŭrinde Victor Jaar venis ĉe la skoltan domon por la ESK-kunsido, kiu ne okazis ĉar la kvorumo ne ĉeestis. Mi ŝatus kore saluti ĉiujn, kiuj ĉeestis tiun memorindan semajnfino. □

De par le monde

par Cyrille Robidoux

Pension présidentielle

Le président Reagan reçoit chaque année une pension de 75 000 \$ pour ses services comme gouverneur de la Californie. À la fin de son mandat, il recevra une pension de 71 000 \$ par année pour avoir servi dans l'armée. Il a aussi droit à 8 400 \$ de pension de vieillesse du gouvernement américain et il recevra 100 000 \$ par année pour son mandat de président. Comme ex-président, il aura droit à la protection gratuite des services secrets, à sa correspondance gratuite, à un cabinet gratuit et à une somme de 150 000 \$ par année pour payer son état-major. [tiré de *Monato*, août 1988]

Les anciens noms

En Union soviétique, il existe maintenant un mouvement dont le but est de faire des pressions sur le gouvernement pour que des villes, des villages, des places et des rues retrouvent leur nom d'avant la révolution. Ainsi sur les cartes géographiques d'Union soviétique, on retrouve la ville de « Neberejnié Tchelni », qui pendant quelques années se nommait « Brejniev ». Dans la ville de Kazan, la capitale de la République autonome des Tatars, la rue Jdanov (idéologue stalinien) a pu retrouver son ancien nom. Jusqu'en 1947, elle se nommait... Espéranto.

À chacun son monument

Les dirigeants de la République soviétique de Lituanie ont décidé d'ériger deux monuments dans la capitale, Vilnius : un en hommage aux victimes du culte de la personnalité pendant l'époque stalinienne et l'autre en hommage à ceux qui ont lutté pour établir le pouvoir soviétique en Lituanie. Autrement dit, un pour les victimes et un autre pour les bourreaux.

Ouverture de frontières

Le gouvernement hongrois veut supprimer ses barrières de sécurité à la frontière autrichienne, parce que celles-ci ne sont plus nécessaires. C'est la première fois que l'on entend un tel discours de la part d'un pays membre du pacte de Varsovie. Surtout que dans les dernières années, la République démocratique allemande et la Tchécoslovaquie ont fortement augmenté la sécurité le long de leurs frontières occidentales. [tirés de *Monato*, oct. 1988]

Les Irlandais et les langues

En prévision de l'ouverture des marchés et des frontières entre pays membres de la C.E.E., le ministère de l'enseignement public irlandais est très préoccupé par le manque de

connaissance des Irlandais des autres langues européennes. Durant les dernières décennies, les Irlandais ont même négligé l'étude de leur langue nationale, le gaélique. L'enseignement des langues est presque inexistant dans les écoles publiques et on doit se tourner vers les centres culturels de la capitale, tel que « l'institut Goethe » ou « l'institut français ». Ce manque de plurilinguisme signifie pour le gouvernement irlandais, que le pays n'est pas prêt pour son intégration européenne et en même temps perd petit à petit sa culture nationale. [tiré de *Monato*, août 1988]

Destructions de villages

L'agence gouvernementale roumaine d'information, « Agerpres », a annoncé que le gouvernement roumain construira jusqu'en 1990 un complexe agro-industriel qui contiendra plus de 100 000 nouveaux logements. Agerpres prétend que ce complexe améliorera le niveau de vie des paysans et leur pouvoir d'achat, tout en leur fournissant de meilleurs services sociaux et culturels. Selon le plan prévu, on détruira jusqu'à l'an 2 000 entre 7 000 et 8 000 villages. Ce que Agerpres oublie de mentionner, c'est que ces villages sont habités en majorité par les minorités hongroises et allemandes. [tiré de *Monato*, sept. 1988] □

Montrealaj paĝoj

de Patriko Mongeau

Jarkunveno kaj elekto de nova estraro

La jarkunveno okazos lundon la 9-an de januaro 1989-a en la Esperanto-domo : 6358, strato de Bordeaux. Tiam, okazos la elekto de nova estraro por 1989. Kandidatoj, kiuj volos sin prezenti, povas aŭ sin anonci skribe, aŭ parole surloke. Eblas ankaŭ proponi aliajn personojn. Verŝajne kelkaj postenoj estos plenigendaj ĉar kelkaj nunaj estraranoj jam anoncis, ke ili ne rekandidatiĝos.

Nova kunvenejo

Nia laborema prezidanto trovis por ni novan kunvenejon. Ĝi situas je 5115, strato Rivard. Ĝi nomiĝas « Centre Saint-Denis ». Ni uzos ĝin unuafoje la lundon 23-an de januaro. Rimarku, ke ĝi escepte estas la kvara, kaj ne la tria lundo. Ni ne ricevis oficialan konsenton de la urbo Montreala pri tiu loko. Ni ricevos ĝin baldaŭ. En kazo de problemo, ni rekontaktos ĉiujn MEK-membrojn, skribe aŭ telefone.

Ekde februaro, la renkontiĝoj okazos en tiu nova kunvenejo, la unuan kaj la trian lundojn de ĉiu monato, je la sepa kaj duono.

La jarkunveno, la 9-an de januaro, do estos la lasta en la Esperanto-domo. Ni dankegas la familion Metz-Fleury pro ilia afabla gastigemo, kiu ebligis, dum pluraj jaroj, amikajn kunvenojn. Ĉiuj scias, ke tiu familio multe vigligis la movadon dum la pasintaj jaroj, kaj daŭre multe laboras. Tamen, ni komprenu, ke la movado, ĉiam pli vastiĝanta, malpli kaj malpli permesis al ili havi privatan familian vivon en sia propra domo. Ni esperu, ke nia nova loko estos paŝo de nia movado al pli asocieca organizo.

Programo de la venontaj monatoj

Ni ne preparis programojn por venontjare. Ĉiuj proponoj estas bonvenaj. Aŭdacu prezenti viajn certe tre interesajn sciojn kaj spertojn al ni.

La lastaj monatoj ebligis al ni aŭdi pri la esperanta kurso en universitato de San Francisko, kaj hajkojn (japanaj poemoj deksepsilabaj). Ni aŭdis ankaŭ kanzonojn de nia talenta prezidanto Silvano Quirion, kiu mem verkis kaj la muzikojn kaj la tekstojn. Lia kontribuo gajigis la etoson de nia kunveno. Espereble aliaj novaj talentoj ekaperos. [Sekvo venontpaĝe]

Kaprompiĝo

de Sylvain Quirion

Niaj lingvoj rompas mian kapon

Kia bela homa kulturo, kiam mi vidas
Tiom da lingvoj, sed neniu parolata de ĉiuj
Mi pensas ke ni ja ŝatas : kvereli, batali kaj eĉ militi

Niaj lingvoj rompas mian kapon

Ekde la elpenso, de la unua lingvo
Celante la komprenon, de ĉiuj ĉirkaŭ
La lingvoj iĝis ilo por la dividado
Kaj la malsimiliĝo inter la homoj

Niaj lingvoj rompas mian kapon

Mi ja estas franclingva, ja estas kebekiano
Kaj ankaŭ multe fieras pri tio
Sed mi unue estas el la homoj kiuj kredas
Al la homeco pli ol al la lingveco

Mi jam verkis la muzikon por tiu poemo. Mi ŝatus renkonti aliajn muzikistojn por verki kanzonojn kune. Se vi kantas aŭ ludas ian muzikilon, verkas poemojn aŭ nur bone konas la sonorajn teknikojn, mi petas ke vi kontaktu min. Skribu (3441, rue Hochelaga, Montréal, H1W 1H4), telefonu (525-1679) aŭ venu al la MEK-renkontiĝo (vidu la Montrealajn paĝojn, pp. 13-14).

Sekvo de la antaŭa paĝo

La provo renkontiĝi en restoracioj por la libera kunveno estis en la komenco tre sukcesa, sed rapide la nombro de partoprenantoj malkreskis. Ĉu pro la baloto de la kanada registraro, kiu okazis je la dato de nia lasta kunveno? Ni ne aranĝis pliajn restoraciajn kunvenojn por venontjare. Se vi tion ŝatus, faru proponojn dum la diskutoj ĉe la jarkunveno. Eble ĉiumonate estis tro ofte.

Formulaire d'adhésion - 1989 - Realigilo

Jam estas malfrue por realigi al E.S.K., se vi ankoraŭ ne faris. Nove estas, ke oni povas aliĝi por unu, du aŭ tri jaroj, aŭ dumvive. Ekzistas la kutimaj membro-kategorioj: ordinara, sam-adresa (por homoj, kiuj loĝas kun ordinara membro) kaj favor-kotiza (por malriĉaj studentoj, senlaboruloj, k.s.).

Si vous ne l'avez pas encore fait, il est plus que temps de renouveler votre adhésion à la Société québécoise d'espéranto. Les Ami-e-s de l'espéranto peuvent dorénavant s'inscrire pour un, deux ou trois ans. Si deux ou plusieurs personnes partagent la même adresse et veulent ne recevoir qu'un seul exemplaire de *la Riverego*, tous, sauf un, peuvent bénéficier du statut d'*Ami cohabitant*. Les Ami-e-s de l'espéranto n'ont pas le droit de vote.

Nomo _____

Adreso _____

_____ poŝta kodo _____

Telefono (____) ____ - ____ Aĝo ____ Profesio _____

	1989	89-90	89-91
Ordinara membro (7 \$, 14 \$, 21 \$)	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
Favor-kotiza membro (5 \$, 10 \$, 15 \$)	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
Nova dumviva membro (175 \$)			<input type="checkbox"/>
Ami de l'espéranto (5\$, 10\$, 15\$)	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>

Sam-adresaj membroj (3 \$ jare kaj home); bv. skribi kiom da jaroj (1, 2 aŭ 3); membres cohabitants (3\$ par année et par personne) ; veuillez écrire le

nombre d'années (1, 2 ou 3) : _____

Mi deziras donaci al E.S.K. - Je désire faire un don à la S.Q.E. _____ \$

La membroj de la Esperanto-Societo Kebekia povas membriĝi en la Kanada Esperanto-Asocio kontraŭ malalta kotizo, se ilia kotizo atingas la oficejon ĝis la mezo de februaro 1989-a. La kotizo por unu jaro (ne ekzistas plur-jaraj kotizoj) estas 12 \$ por ĉiu homo (ne ekzistas kotizo por sam-adresaj membroj). Hoku ĉi tie se vi volas aliĝi al K.E.A. kaj skribu [K.E.A.] apud la nomo de la sam-adresaj membroj, kiuj aliĝas al K.E.A. La ordinara kotizo de K.E.A estas 24 \$.

Kiom da aliĝoj al K.E.A. _____ x 12 \$ = _____ \$

La Riverego

Esperanto-Societo Kebekia
Decembro 1988-a. N-ro 13-a.

Ĉi-numere :
Réabonnez-vous
Novaj asocioj en Kanado
Pri la Tririvera renkontiĝo
Quelques revues espérantistes
Enketo pri la tutmonda Esperantistaro

Société québécoise d'espéranto
C.P. 126, succ. « Beaubien »
Montréal H2G 3C8